

# Ludoviko Braille kaj Hieronimo Lorm

Oldřich Arnošt Fischer

Prelego por Societo por la internacia lingvo Esperanto, la 18-an de februaro 2015

## Ludoviko Braille

Vidsento estas signifa por homa vivo. Oni diras, ke homo akceptas 80 % da informoj per vidsento. Sed kelkaj homoj ne vidas aŭ vidas malbone. Situacion de blinduloj plibonigis genia franca instruisto Ludoviko Braille (Louis Braille, 1809 – 1852). Li naskiĝis en familio de selisto. Kiam li estis trijara, li ludis kun selista kudrilo kaj pikis sin en sian okulon. La vundo infektiĝis, la infekto disvastiĝis en la duan okulon kaj malgranda knabo blindiĝis. Post dekdu jaroj (1824) vizitis la familion parenco, kiu estis oficiro de franca armeo, kapitano Charles Barbier de la Serre. Li rakontis, ke francaj soldatoj uzadas specialan alfabeton, danke al kiu ili kapablas legi komandojn eĉ nokte, en tuta mallumo. Lia rakonto inspiris 15-jaran knabon, kiu rapide eklernis tiun alfabeton. Poste li kapablis studi kaj fariĝis instruisto. Li mortis de tuberkulozo en Parizo en la jaro 1852.

Ĉeĥa poŝto eldonis belan poŝtmarkon kun portreto de Ludoviko Braille (**Bildo 1**).

La armea alfabeto uzadis sistemon de dekdu punktojn. Braille en la jaro 1824 la sistemon plifaciligis; li kreis el sistemo kun dekdu punktoj sistemon kun ses reliefaj punktoj aranĝitaj en oblongo (**Bildoj 2 - 4**). Ekzistas ankaŭ okpunta sistemo, sed ĝi ne estas ofte uzata. Ekde la jaro 1932 oni uzadas variantojn de alfabeto de Braille en ĉiuj landoj.

Por skribado oni uzadas skribmaŝinon, kiun esploris germana instruisto Oskar Picht.

Malavantaĝoj de Brajla skribo

Literoj estas pli grandaj ol literoj de normala skribo. Tial libroj presitaj en Brajla skribo estas pli longaj ol normalaj libroj. Ankaŭ tabeloj, formuloj kaj ekvacioj estas malfacile skribeblaj.

Ĉiu nacio havas sian propran version de brajla skribo.

## Hieronimo Lorm

Hieronimo Lorm, propranome Heinrich Landesmann, naskiĝis la 9-an de aŭgusto 1821 en sudmoravia urbo Mikulov (**Bildo 5**). En la jaro 1454 tien post malamika predikado de itala franciskano Johano Kapistrano (Giovanni da Capistrano, 1386 – 1456) estis elpelitaj judoj el Brno. Juda komunumo de Mikulov fariĝis la plej signifa en Moravio. Mikulov estis rezidejo de moravia landa rabeno Mordeĥaj Benet, kromnomata Mirakla. Tie funkciis 12 sinagogoj kaj loĝis pli ol 3 500 judoj (**Bildoj 6 – 7**).

Henriko (Heinrich) estis la dua filo de estimata juda komercisto, kiu loĝis en juda kvartalo.

Kiam Henriko estis unujara, la familio translokiĝis en Vienon, kie lia patro Christian Landesmann en la jaro 1822 fondis faman komercan domon C. Landesmann kaj filo. Henriko tie ekstudis en politeĥniko kaj li samtempe studis muzikon. Li havas grandan talenton kaj povus fariĝi eĉ piana virtuozo. En la jaro 1834 li malsaniĝis tiel, ke li malbone vidis kaj aŭdis. Kuracistoj ne kapablis diagnozi kaj kuraci lian malsanon. Post du jaroj li kiel 16-jara surdiĝis. Li studis private kaj ekverkis poemojn. Lia unua poemo „Lamento de surdulo“

estis publikita en la ĵurnalo Österreichische Morgenblatt en la jaro 1837. Krom tio li publikadis siajn poemojn en la ĵurnalo Allgemeine Theaterzeitung. Danke al sia patro, kies salonon vizitadis grandaj personecoj de tiama literatura vivo, li eksciis mondon de literaturo. Lia unua signifa verkaĵo estis eposo „Abdul“ (1843), rakonto pri araba doktoro Faust. En julio 1845 lia maldekstra okulo inflamiĝis, poste blindiĝis kaj ankaŭ lia dekstra okulo ne estis en ordo.

Henriko Landesmann travivis sian junecon en epoko de absolutismo de kanceliero Klemens Wenzel Nepomuk Lothar Metternich (1773 – 1859) kaj havis nekonformajn opiniojn. Pro tio li estis persekutita. Li kritikis politikan kaj literaturan vivojn de tiu epoko. Li prenis pseŭdonimon Hieronimo Lorm. Sankta Hieronimo skribis pri solena vivo kaj finis sian vivon kiel ermito. Familia nomo Lorm devenas el romano de angla verkisto George Payne Rainford James. Heroo de la romano estis L'Orm.

Hieronimo Lorm kritikis antaŭjuĝojn kontraŭ judoj, kiuj antaŭ la jaro 1848 ne estis plenrajtaj civitanoj de ŝtato. Lia unua romano estis „Ein Zögling des Jahres“ („Disĉiplo de jaroj“) el la jaro 1848.

Li volis eviti malliberadon, tial li en la jaro 1846 foriris en Germanion kaj ekloĝis en urbo Leipzig. Tie oni eldonis lian libron „Wien's poetische Schwingen un Federn“ („Vienaj poeziaj flugiloj kaj lanugeroj“), en kiu Lorm kritikis politikan situacion en Vieno. Li akceptadis en sia domo multe da vizitantoj, sed ne aŭdis kaj tial ili devis skribi al li anstataŭ parolado.

Kiam Lorm blindiĝis, li donadis siajn fingrojn inter lipojn de parolantoj, por ke komprenu. Sed li baldaŭ ekopiniis, ke tio estas neestetika kaj nehigiena.

Kvankam sia malsano, li en la jaro 1848 en Berlino batalis sur barikadoj.

En la jaro 1848 abdikis kanceliero Metternich, sed komencis absolutismo de imperiestro Francisko Jozefo la 1-a (1830 – 1916), kies simbolo fariĝis ministro Alexander Bach (1813 – 1893). Lorm revenis en Vienon. Li fariĝis ĵurnalisto kaj verkis kritikojn, kiuj estis publikitaj en la ĵurnaloj Allgemeine Zeitung, Presse kaj Stuttgarter Morgenblatt. En la jaro 1853 Lorm translokiĝis en la urbeton Baden, kiu situas proksime Vieno. Li estis estimata kritikisto, komentadis politikajn kaj sociajn aferojn, verkis romanojn, rakontontojn, poemojn kaj teatrajn ludojn, kiujn oni ludis en fama teatro Burgtheater.

En la jaro 1856 Lorm edziĝis kun sia kuzino Henriette Frankl. Ili havis tri infanojn: filinon Marie (\*1857) kaj filojn Ernst (\*1863) kaj Adolph (\*1867). En la jaro 1867 vidsento de Lorm plimalboniĝis. Li estis operaciita, sed kvankam uzado de specialaj okulvitroj li preskaŭ ne kapablis legi kaj skribi. Kun siaj familianoj li komunikis per sia alfabeto. Li publikis kelkajn poemarojn kun lirikaĵoj.

Nova konstitucio en la jaro 1867 donis emancipadon al judoj, sed en la socio restis antaŭjuĝoj.

En la jaro 1873 Lorm kun tuta familio translokiĝis en la urbon Dresden. Li tie verkis kelkajn romanojn. La plej bonaj estas „Die schöne Wienerin“ („La bela vienanino“) kaj „Die

mährische Grafín“ („La moravia grafino“). Krom tio li verkis poemojn kaj filozofiajn verkaĵojn. Oni kelkfoje publikigis lian verkaĵon „Der Naturgenuß“ („Ĝuo de naturo“).

Liaj filozofiaj artikoloj estis publikitaj en la ĵurnalo Die Gegenwart (Nuntempo).

Pro siaj meritoj li en la jaro 1873 fariĝis honora doktoro de filozofio en la Universitato de Tübingen.

Li blindiĝis en la jaro 1882. Lia filino Marie helpis al li 20 jarojn kaj tradukis ĉion uzante specialan kontaktan alfabeton. Lorm estis granda optimisto, homo, kiu ŝatis vivon, bonan manĝaĵon, li trinkis vinon, fumis cigarojn kaj ŝakludis. En la jaro 1894 li publikis sian verkaĵon „Der grundlose Optimismus“ („Senfunda optimismo“). Hieronimo lorm mortis la 3-an de decembro 1902. Liaj lastaj vortoj apartenis al trinkaĵo, kun donis al li lia filino Marie: „Tio estis bona“. Li estis entombigita en juda tombejo en Brno-Židenice (**Bildo 8**).

Alfabeto de Lorm estis germana. Ĉeĥa monaĥino, boromeanino Aquina Anna Sedláčková, kiu laboris en Instituto por blinduloj (nuntempa Lernejo Jaroslav Ježek) kreis kaj poste uzadis ĉeĥan varianton de tiu alfabeto..

Nuntempa varianto estis kreita en la jaro 1993 (**Bildo 9**). En Ĉeĥa respubliko ekde la jaro 1991 laboras Societo LORM, kiu helpas al surd-blinduloj.

Por instruado kaj lernado de alfabeto de Lorm ni uzadas specialajn gantojn kun skribitaj literoj. En ĉeĥa lingvo ekzistas mnemonika helpilo por la lernado (**Bildo 10**):

**A E I O U Y**

**A E I O U Y**

**To Byl Dobrý Guláš, Horký, S Cibulí!**

Tio estis bongusta gulaŝo, varmega, kun cepo!

**CHutnal Fakticky Náramně.**

Ĝi gustis fakte ege.

**Malý Labužník Quido Xaver Kožený**

Malgranda frandemulo Quido Xaver Kožený

**Je Zase Rychle V Pohodě.**

havas denove rapide bonhumuron.

Helpe de la mnemoniko oni povas lerni literojn A, E, I, O, U, Y (**Bildo 11**), T, B, D, G, H, S, C (**Bildo 12**), CH [ĥ], F, N (**Bildo 13**), M, L, Q[kv], X [ks], K (**Bildo 14**) kaj J, Z, R, V, P (**Bildo 15**). Oni povas skribi ekzemple la vorton ESPERANTO (**Bildo 16**).

Moravia landa rabeno Baruh Jakob Placzek en sia poemo montris Lormon kiel vunditan arbon. El la vundo de la arbo elfluas rezino, balzamo, kiu helpas al homoj.

### **Rekomendita literaturo**

HORA-HOŘEJŠ, P. (1998): Toulky českou minulostí. La 7-a volumo, la 1-a eld., Prago, Via Facti, 222 paĝoj.

MASSOVÁ, D. (2011): Hieronymus Lorm – Muž, jenž otevřel hluchoslepým svět, la 1-a eld., Mikulov, Regionální muzeum v Mikulově, 27 paĝoj – ISBN 978-80-85088-40-3.

SMÝKAL, J. (1986/1987): Hieronymus Lorm, tvůrce prstové abecedy pro hluchoslepé. K 165. výročí narození autora. Otázky defektologie, 29: 243-246.

JUDA KOMUNUMO EN BRNO: Путеводитель по брненскому еврейскому кладбищу (informilo por vizitantoj de juda tombejo en Brno-Židenice en rusa lingvo). [www.jewishbrno.eu](http://www.jewishbrno.eu).

<p>Bildo 1: Louis Braille (4.1.1809 Coupvray – 6.1.1852 Parizo)</p> 	<p>Bildo 2: Brajla ĉelo – oblongo kun 0 – 6 punktoj (Alfabeto de Braille, 1824)</p> 	<p>Bildo 3: ESPERANTA BRAJLO</p> 	<p>Bildo 4: La vorto <b>ESPERANTO</b> skribita brajle</p> 
<p>Bildo 5: <b>Mikulov</b> – la urbo, kie naskiĝis Hieronimo Lorm</p> 	<p>Bildo 6: Juda tombejo en Mikulov</p> 	<p>Bildo 7: Sinagogo – unu de 12 sinagogoj, kiuj estis en Mikulov</p> 	<p>Bildo 8: Tombo de Hieronimo Lorm kaj lia edzino en juda tombejo en Brno-Zidenice (Heinrich kaj Henriette Landesmann). La 14-an de septembro 2014.</p> 
<p>Bildo 9: Alfabeto de Lorm (1993), ĉeĥa versio sen diakritiko</p> 	<p>Bildo 10: Ĉeĥa mnemonika helpilo por lernado de alfabeto de Lorm</p> <p><b>A E I O U Y</b>  <b>To Byl Dobrý Guláš, Horký, S Cibulí!</b>  <b>CHutnal Faktický Náramně,</b>  <b>Malý Labužník Quido Xaver Kožený</b>  <b>Je Zase Rychle V Pohodě.</b></p> <p><b>A E I O U Y</b>  <b>Tio estis bongusta gulaĵo, varmega, kun cepo!</b>  <b>Ĝi gustis fakte ege.</b>  <b>Malgranda frandemulo Quido Xaver Kožený</b>  <b>havas denove rapide bonhumuron.</b></p>	<p>Bildo 11: A E I O U Y</p> 	<p>Bildo 12: <b>To Byl Dobrý Guláš Horký S Cibulí</b></p> 
<p>Bildo 13: <b>CHutnal Faktický Náramně</b></p> 	<p>Bildo 14: <b>Malý Labužník Quido Xaver Kožený</b></p> 	<p>Bildo 15: <b>Je Zase Rychle V Pohodě</b></p> 	<p>Bildo 16: La vorto <b>ESPERANTO</b></p> 